

Ada S I K O R S K A
Radio-jurnalisto
varsovio

=

Gian Carlo F I G H I E R A
Kongresa sekretario
bruselo

geedziĝos . . .
la 20an de aprilo 1960

Kara koleg(in)o,

Antaŭ du semajnoj, el polujo alvenis F-ino Ada SIKORSKA, la fianĉino de la K.K.S., S-ro G.C.Fighiera. Ŝi rajtas restadi en Belgujo ĝis la 22a de tiu ĉi monato.

La gefianĉoj intencis geedziĝi en oktobro proksima. Restis tamen granda demanda signo, ĉu ŝi tiam ankoraŭ ricevos novan pasporton por forvojaĝi duafoje en sama jaro.

Tial kelkaj inter ni helpis ilin rapidigi la formalizaĵojn, tiel ke ili povu unuiĝi ankoraŭ dum ŝia nuna libertempado en Belgujo. Kaj ni nun scias firme, ke la geedziĝo povos okazi en Bruselo, merkredon, la 20an de aprilo.

Mi persone, -kaj kelkaj aliaj kun mi -, opinias ke, pro foresto de ambaŭ familioj, la belga esperantistaro havas kiel devon, iomgrade anstataŭi la naturajn parencojn.

Mi akceptis esti, ni diru, la edziĝa patro kaj mi invitas vin partopreni, se iel eble, al festeneto, kiun ni intencas okazigi tiun tagon en iu restoracio de la ĉefurbo, je la 6a vespere, tiel ke ĉiu povu ankoraŭ decatempe rehejmiĝi.

Mi ne jam povas definitive indiki la lokon nek kondiĉojn, ĉar tiuj dependas de la nombro de partoprenontaj amikoj. Sed ni diru, ke la manĝo ne kostos pli ol tiu de ordinara grupa festeno. (do ĉirkaŭ Fr.150).

Mi deziras ricevi kiel eble plej rapide respondon pri via eventuala partopreno (sola aŭ kun familianoj). Mi direktas la nunan inviton al tiuj, kiuj konas S-ron Fighiera jam persone, do al la prezidantoj de B.C.K.E. kaj de FL.L.E., al la administrantoj de R.B.L.E. kaj kompreneble al ĉiuj L.K.K.-anoj. Sed tiu invito ne estas limiga kaj ĉiuj, kiuj deziras aliĝi, estas bonvenaj... La celo ne estas, ke iĝu granda manĝofesto laŭnombra, sed montrado de simpatio al vera sindona kunlaboranto de "nia" 45a kaj al ĉarma pola samideano, kiu baldaŭ iĝos itala civitanino, sed, preskaŭ tuj, devos reiri al polujo, por liberigi sin de sia profesia devo kaj fari diversajn lastajn aranĝojn en sia ĝisnuna patrujo.

Se vi ne povus partopreni, mi estus tamen danko al vi, se vi bonvolus sendi simpati-esprimon, tiun tagon, al la adreso de nia oficejo, samtempe loĝejo de S-ro Fighiera (Karmelietenstraat, 9a, rue des petits carmes).

Kun sincera saluto.

La edziĝa patro
Maur. JAUMOTTE.